# *Rekorda indikilo de infanmorteco en Kubo.*



Havano, 2 jan (RHK) Kubo sukcesis redukti la indikilon de infanmorteco je la fermo de la jaro 2017 ?is 4,0 por ?iu mil vivnaskito, kio konsistigas historian kaj eksterordinaran rekordon.

Tion konfirmas la unuaj datumoj prezentitaj de la taggazeto Granma la? la medicinaj registroj kaj statistikoj de sano, kiuj raportas ke dum la jaro okazis 114 980 naskoj, 1 892 malpli ol en la jaro 2016, kaj okazis 465 mortoj en infanoj malpli ol unu jaro, tio estas, 32 malpli ol la mortoj okazintaj ?is la momento registrita.

On devas memori ke en la jaro 1970 la mortoj okazintaj estis 9 173,  kio reprezentis 38,7 por ?iu mil vivnaskito, kio evidentigas la solidan laboron faritan por redukti la infanmortecon en la insulo, kio reprezentas, unualoke, grandan sinoferon, klopodojn kaj sindevigon de miloj da profesiuloj kiuj laboras en la servoj de atento infano-patrina en Kubo.

Tia indikilo anka? estas rezulto de la konstanta laboro de la gvidantoj en la sansistemo kuba kaj la laboro en ?iuj ?iaj sferoj, la? asertis la doktoro Roberto Álvarez Fumero, estro de la departemento infano-patrina de la ministerio pri publika sano.

Inter la faktoroj kiuj kontribuas al tiu ?i rezulto estas la da?raj transformoj en la baza atento pri sano, perfektigo de la funckiado de la patrinaj hejmoj, evoluigo de komunuma genetika reto kaj perfektigo de la programo por preventado, diagnozo kaj traktado de genetikaj malsanoj, plus la kreado de gvidlinioj por

agadi fronte al la ?efaj obstetrikaj dama?oj per la enkonduko de la teknologio kun prognoza laboro.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/151601-rekorda-indikilo-de-infanmorteco-en-kubo

**Radio Habana Cuba**